

*Rio
Esperantista*



ASOCIO ESPERANTISTA
DE RIO-DE-JANEIRO
Oktobero – Novembro – 2013

Kultura Revueto

de

AERJ



Museo Nacional – Rio-de-Janeiro

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE- JANEIRO

oktobro – novembro – 2013

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO

★ Rua Teófilo Otoni, 135 / 302 ★

☎ 2467-4296 – ✉ aerjrj@hotmail.com e www.aerj.org.br

Redaktas: *Paulo Sérgio Viana*

Aranĝas: *Alfredo Aragão*

RIO ESPERANTISTA

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Karaj legantoj,

Aktivaj Esperantistoj, kiuj akompanas la internacian movadon, certe ricevis lastatempe interesajn ĝojigajn informojn. Ili venas el pluraj lokoj.

El Brazila Esperanto-Ligo ni kun kontento regule informiĝas per la interreta bulteno “BEL-informas”. Ĝi estas dinamika, ofta kaj riĉenhava. Ĝi iamaniere donas sencon al la jara aliĝkotiĝo, se oni plu akurate eldonas krome la belan revuon “Brazila Esperantisto”. Alia bonvena novaĵo estas la funkciigo de BEL-butiko”, kiu konsiderinde faciligas la aĉetadon de libroj kaj aliaj varoj, fare de la brazila publiko. Gratulon al la Estraro de BEL. Nuntempe jam ne praviĝas la aserto, ke brazilanoj ne legas Esperantolibrojn pro malfacileco havigi ilin al si.

Pliaj feliĉigaj informoj venas de la respondeculoj pri la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos proksiman jaron en Fortaleza/Ceará. Ĝi certe estos

granda sukceso. La Brazila Kongreso de Esperanto en Florianópolis/Sankta Katarino same progresas kaj antaŭvidigas belan sperton al partoprenantoj. Estu vi mem unu el ili!

En interreto, vekas la atenton la grava retejo edukado.net. Kiuj abonas ĝiajn korespondaĵojn, tiuj lastatempe certe surpriziĝis de la anoncoj pri novaj kursoj de Esperanto en Brazilo. Dum la lastaj semajnoj, komenciĝis en nia lando amaso da ili. Jen kial oni aŭdas tra la mondo laŭdojn al la vigleco de la brazila movado. Ni tamen ne iluziiĝu. Ni devus kontroli ankaŭ pri la sukceso de tiuj kursoj. Ĉu proporcie kreskas la brazila Esperantistaro? Intertempe, faras sencon la klopodo de AERJ por formado de kompetentaj Esperantoinstruantoj. Ni nepre zorgu pri la kvalito de niaj multenombraj kursoj por komencantoj. Ĉi tio estas urĝa tasko.

—*P.S.V.*

VORTOJ DE LA ESTRARO

Refoje ni parolas al vi, kara leganto, pere de tiu ĉi tradicia bulneto. Ni komencu dirante, ke AERĴ nun laŭiras vojon de rimarkindaj ŝanĝoj, por strukturiĝi kaj adaptiĝi al tiu nova mondo, pli dinamika, eĉ hastema, kaj ankaŭ por pli bone agi favore al Esperanto kaj al la Riĉa esperantistaro.

Indas informi, ke kvankam la Statuto estis aprobita de la Ĝenerala Asembleo Eksterordinara (ĜAE) en aprilo pasinta, ĝi tiam ne estis de la Civila Registaro (CR), ĉar bezonatis ĝustigi kelkajn administrajn

postulojn. Tial, la 14-an de Septembro ni denove kunvokis la ĜAE-n por plenumi ĉiujn fendaĵojn kaj tiam estis aprobita la lasta versio de la Statuto, kiu ankoraŭ bezonas la agnoskon de la CR. La sola ŝanĝo estis la nuligo de estrarŝanĝo kaj tial la pasinta estraro daŭre oficas ĝis la plenumo de ĉiuj leĝaj postuloj.

Tamen, ne estas loko por malĝojo ĉar multaj projektoj estas venontaj ĉe la informa, eduka, kunlabora, trejniga kaj disvastiga sferoj, laŭ la celoj elektitaj de la Asocio.



ARTIKOLO



MALBA TAHAN – Aŭdino Castelo Branco

MalbaTahan estas la pseŭdonimo de Júlio César de Mello e Souza, fama instruisto pri matematiko en Brazilo. Li naskiĝis en 06.05.1895, en la urbo Queluz, en la ŝtato San-Paŭlo, kaj mortis en Recife en 17.05.1974.

MalbaTahan estis unu el la plej gravaj kaj popularaj verkistoj pri distra matematiko en la tuta mondo.

En la komenco de la pasinta jarcento, estis malfacile por brazilaj aŭtoroj publikigi ion ajn. Eldonistoj kaj ĵurnalposedantoj timis malprofiton. Do, klopodante lanĉi sin kiel verkisto, Júlio César Mello e Souza decidis krei personon ekzotikan kaj fremdan al la brazila

laj kutimoj. Li decidis ŝajnigi sin kiel tradukiston pri libroj kaj rakontoj de tiu supozata araba verkisto.

En 1952, la tiam aŭtoro prezidanto de Brazilo elsendis oficialan dekreton, kiu permesis al la civitano Júlio César de Mello e Souza, la leĝan uzon de la kaŝnomo Malba Tahan.

MalbaTahan eldonis ĉirkaŭ 120 librojn pri Distra Matematiko, pedagogio pri Matematiko, Historio pri Matematiko kaj porjunulara literaturo, atingante pli ol 2 milionojn da ekzempleroj.

Lia plej populara verko estas, “La homo kiu kalkuladis” (pli ol 40 eldonoj) rakontas la historian pri arabo en lia

vagado en la dezerto, uzante matematikon por solvi problemojn pri la arabakulturo.

En Brazilo, omaĝe al tiu fama instruisto, en la datreveno de lia naskiĝo (la 6-an de majo) oni festas la “MATEMATIKAn TAGOn”. En tiu tago, oni proponis diskutojn, ludojn, labortagon, spektadon de filmoj kaj teatraĵoj, legadon, ekspozicion, metiejon kaj aliajn lerneajn aktivecojn.

Referencoj:

<http://www.mat.ufrgs.br/~portosil/malba.html>

<http://www.matematicahoje.com.br/telas/cultura/historia/educadores.asp?aux=A>

http://pt.wikipedia.org/wiki/J%C3%BAlio_C%C3%A9sar_de_Melo_e_Sousa

NOTO DE LA REDAKTOROJ:

Malba Tahan estis simpatianto de Esperanto, kaj lia frato João Batista de Mello e Souza, ankaŭ talenta verkisto, estis mem aktiva Esperantisto, kaj eĉ persone konis Zamenhof-on

ĈINA SAMIDEANO SKRIBAS AL “RIO ESPERANTISTA”



Teddy Nee, el Tajvano -

Kial Ni Bezonas Fremdajn Lingvojn?

Mi pensas, ke ni devus akcepti, ke la mon-do estas pli "malgranda" ol antaŭe. Ni estas konektitaj unuj al aliaj - ne gravas el kiu lando, parolante kiun lingvon, aŭ havante kiun kulturon. Ni bezonas komunan lingvon por komuniki. La angla estas la inter-nacia lingvo, tamen ne ĉiuj parolas angle. Por atingi tiujn personojn, ni bezonas uzi iliajn lingvojn aŭ fremdajn lingvojn, kiujn ili konas. Fremdaj lingvoj ankaŭ ebligas al ni komunikiĝi kun tiuj, kiuj ne parolas ni-an lingvon.

Pli da Lingvoj, Pli da Ŝanco

Fremda lingvo (ekz. Esperanto) donis al mi ŝancojn por koni amikojn

el aliaj landoj, lerni pri ilia kulturo, kaj eĉ ili igis min rimarki, ke ni efektive dividas multajn komunajn interesojn. Ni povas ankaŭ interŝanĝi sciojn pri nia kulturo. Mi kredas, ke ĉiu fremda kulturo ne estas tia lstranga kiel ni pensis. .

La angla estas je plej alta nivelo postulata fremdlingvo en multaj landoj, sed, denove, ne ĉiuj parolas angle. Ili povas havi mal facilajn por lerni la anglan aŭ simple ne havas ajnan motivadon por lerni la anglan. Ekzistas eĉ homoj kiuj asertas ke ili ne povas bone paroli la anglan post jaroj da lernado.

www.neeslanguageblog.com



POR LERNI LINGVON ONI DEVAS PLONĜI EN ĜIN



Erialdo Rodrigues Alves

La ĉi-subaj rimarkoj temas precipe pri la instruado de Esperanto por portugallingvanoj, tamen la plejmulto el ili nepre estas taŭgaj por la instruado de iu ajn fremda lingvo.

La lernanto finis la bazan kurson, do estas inde ke li daŭrigu la lernadon kaj fariĝu progresanto.

Feliĉe, Esperanto estas facila lingvo, kaj eblas ke eĉ nova lernanto, en relative mallonga tempo, kapablu skribe komunikiĝi kun aliaj esperantistoj ie ajn en la mondo, ĉefe per interreto.

Sed komunikiĝi nur skribe ne sufiĉas por ĝojigi la koron. La vera plezuro apenaŭ aperas kiam oni kapablas esprimi sin voĉe en bona Esperanto, kaj perceptas ke la tempo elspesita en ĝia lernado valoris, valoras kaj valoros la penon.

Do, venas la momento por ke oni plibonigu la sciojn kaj esprimu sin flue kaj lerte, la momento por plonĝi pli profunde en la lingvon. Por efike tion fari, oni devas enkapigi la sinsekvon de necesoj kiujn oni devas plenumi por atingi la finan celon, nome, la fluecon de parolado. Pro tio tre gravas la jenaj agoj: aŭdkapablo, pro-nonco, vortaro kaj efektiva plonĝo en la lingvon.

Aŭdkapablo

Antaŭ la apero de interreto, homoj kiuj komencis lerni Esperanton havis

tro multe da malfacilecoj por aŭdi ĝin. Nur la kongresoj, renkontoj kaj kluboj estis por ebligi la trejnadon de la aŭdkapablo de progresantoj. Nuntempe tio ĉi fariĝis multe pli facila. Simpla enteto en Jutubo, ekzemple, pere de ŝlosilaj vortoj kiel 'esperanto' aŭ 'prelego', ebligas ke oni aŭdu amason da voĉoj de eminentaj esperantistoj, kiuj parolas la lingvon eligante perfektan elparoladon.

Do, la unua celo devas esti la aŭdkapablo, la bona kompreno de la koncerna lingvo. Unu el la plej efikaj metodoj por plibonigi ĝin konsistas en la aŭskultado de radio.

Ne gravas ĉu la progresanto dekomence komprenas nenion, oni devas daŭrigi la procezon, certe baldaŭ la kompreno pli kaj pli alvenas, se oni ne rezignas kaj ade insistas. La Esperanta Retradio vere indas tiucele, ĉar ĝi prezentas ĉiutage interesajn podkastojn pri diversaj aferoj kies celo estas ĝuste helpi la esperantistojn bone regi la lingvon. Estas aliaj radio-stacioj kiuj povas tre bone esti uzataj por tiu celo, inter aliaj mi povas rekomendi kelkajn tre bonajn, nome: Radio Muzaiko, Radio Vatikana, Radio Verda, el Kanado, Radio Havano, el Kubo, Radio 3ZZZ, el Aŭstralio, Pola Radio, inter multaj aliaj. Nuntempe estas tre alta la nombro da radiostacioj kiuj alsendas per interreto.

Krom radio la esperantisto disponas je pluraj retadresoj plenaj de vide-

oj, ni jam citis Jutubon, kiu havas amason da videoj en Esperanto. Tre bona retejo estas ankaŭ "El Popola Ĉinio", vere indas viziti ĝin.

Bona prononco

Bona prononco postulas iom da trejnado fare de la progresanto, kaj estas necese ke oni zorgu pri kelkaj gravaj detaloj, kiujn ni priparolas sekve.

Se oni fakte deziras ellerni la lingvon, estas esence, ke oni klopodu bone prononci la parolojn en ĝi. En la kazo de Esperanto, la akiro de bona elparolado postulas apenaŭ iomete pli da peno, ja ĝia prononcmankado estas relative simpla. Per iomete da trejnado la sonoj de la paroloj sukcesas esti vortigitaj sufiĉe korektaj. Kaj la relative neintensa penado indas, ĉar la ĝojo pro la bona eldirado de vortoj certe donos fieron al la esperantisto kiu trovas ĝin. La progresanto devas atenti pri la fakto ke Esperanto ne havas mutajn literojn, ĉiu litero havas sian respektivan sonon, kiu devas esti elparolata klare kaj belsone. Kiel ekzemplon, mi povas citi du kazojn kiuj tre ofte estigas erarojn en la prononco de vortoj fare de esperantistoj de portugallingva deveno: - la litero N, kiam troviĝas kaj inter du konsonantoj, kaj en la fino de vortoj, ne devas esti vortigita nur per la nazo, sed per la nazo kune kun la lango tuŝanta la palaton; la litero L, neniam devas esti vortigita kvazaŭ U, sed per la lango tuŝanta la palaton.

La sono de la literoj H kaj Ĥ ankaŭ prezentas rimarkindajn diferencojn. La sono de la litero Ĥ, kiu aperas ĉefe en malnovaj tekstoj, okazas tre malofte en normala parolado, do la tendenco

estas je ĝia malapero, ĉar ekde la komenco oni kutime anstataŭigas ĝin precipe per la litero K, kies sono estas iomete simila. La esperantistoj devas atenti pri la fakto ke, por prononci Ĥ, la lango devas milde tuŝi la postpalaton, dum tio ne okazas por prononci H, kiu estas tute elspirita.

Do, estas inde ke oni trejnu sian prononcadon celante akiri esprimmanieron pli klaran kaj agrablan al siaj geaŭskultantoj.

Akiro de novaj vortoj

Oni sukcesas koni novajn vortojn en iu ajn lingvo precipe per legado de bonaj libroj kaj revuoj. Interreto multe helpas la esperantiston tiucele, ĉar ĝi ebligas multajn retejojn en Esperanto, partoprenon en forumoj, telekonferencoj, ktp. Fakte nuntempe oni disponas de pluraj rimedoj por multigi la agnoskon de novaj vortoj. Estas nepre rekomendinda la legado de verkoj de la pioniroj, ĉar ili sukcesis skribi verajn ĉefverkojn pere de malmulte da vortoj, ĉar en tiu tempo la kvanto de vortoj estis ja tre malmultnombra ol en la estanteco. Evidente oni devas disponi pri bona vortaro, nuntempe estas pluraj, kiuj estas disponeblaj inkluzive en la interreto por tuja uzado, inter aliaj estas PIV kaj Reta Vortaro.

Por plonĝi pli profunde

Diligentaj progresantoj nepre fariĝas scivolemaj pri la gravaj faktoj kiuj rilatas al nia internacia lingvo. La sciigoj pri diversaj aspektoj kiel, ekzemple, la vivo de Zamenhof, la interna ideo, la fina venko, la historio de la movado, ĝia aktuala situacio, la pioniroj, la emi-

mentaj verkistoj, la ĉefaj verkoj, la nobla karakterizo de esperanto kiel ilo por disvastigi komprenon kaj pacon inter la homojn, sume, la tuto de la aferoj kiuj influis je ĝia formado, hel-

pas al iu ajn esperantisto pli profunde plongi en la lingvon.



ORIGIALE!



Fernando Pita

Oni multe diras ke brazilanoj malmulte legas, kaj, kvankam tio estus diskutibla, fakte tio veras almenaŭ kiam oni kalkulas la kvaliton de kio estas legata: ĝenerale klaĉrevuoj kaj memhelpaj libroj konstituas la furoraĵojn de niaj librovendejoj.

Malfeliĉe tia situacio tuŝas ankaŭ nin esperantistojn; krom instrumentadoj, vortaroj kaj gramatikoj, la plejmulto el ni apenaŭ legas ian literaturan verkon, ĝenerale elektante librojn tradukitajn el la brazila literaturo mem, argumentante ke tiamaniere oni povas "kompari" la tekstojn kaj lerni ion pli. Bone, ĉu tio ja funkcias estas tro diskutenda afero, ĉar malgraŭ la sindediĉo, la rezultoj ĝenerale estas tro malgrandaj.

Kelkaj aliaj elektas verkojn tradukitajn el kulturoj, al kiuj ili neniam alirus sen la helpo de Esperanto. Bone, tio vere aspektas plej bona elekto, almenaŭ ĉar la legonto ekkontaktos novan kulturon, kaj devos ankaŭ elturniĝi por, forĵetinte la kompareblon, kompreni la tekston kaj konsekvence pli

funde lerni Esperanton. Sed, ekzakte kiel antaŭe, oni neniel plongas en veran esperantan tekston kaj stilon, sed nur en peresperantan reprodukon de tiu eloriginala tradukaĵo.

Tiuj du elektoj havas ankoraŭ tre malbonan rezulton: multe da esperantistoj neniam legos niajn originalajn verkojn, neniam (ek)konos tiujn perlojn kaj juvelojn de nia esperanta kulturo, produktitajn de vere sindonemaj kaj talentaj homoj kiuj dediĉis parton de sia vivo por krei veran trezoron, al kiuj ĉiuj esperantistoj rajtas aliri kaj ĝui. Plej grave: ĉar lingvo estas parto, eĉ se la plej grava, sed finfine nur nedisigebla ero de tuta kulturo, kiuj konas la lingvon sed ne dediĉas sin al profundigado de la kulturo kiu en ĝi estas produktata, tiuj neniam plene regos tiun kulturon nek tiun lingvon mem.

Do urĝas kaj gravegas, por kapabligo kaj plibonigo de la kultura nivelo de l' esperantistaro, ke ni nin dediĉu al la originala esperanta literaturo, legante tiujn verkojn kaj elprenante el ili ne

nur lingvajn konojn, sed ankaŭ la grandegajn plezuron kaj orgojlon partopre-

ni tiom riĉenhavan kaj inspirdonan areton de la homa kulturo: la nia!



EL NIAJ KLASIKULOJ



Eŭgeno Lanti

*“Homo artefaris esperanton; homoj, mi-
loj da homoj aplikas ĝin kaj per tio arte ali-
igas la medion, faciligante la interrilatojn,
kreante novan spiritostaton, eĉ novan ideo-
logion...”*

*Tamen restas multnombraj revoluciuloj,
internaciistoj tiom sklave adaptiĝintaj al la
medio, tiom rutinemaj sur tiu kampo, ke ili
tute ne atentis la mondlingvan movadon. Se*

*hazarde, okaze, ili paroletas pri “kunfandi-
ĝo de nacioj”, tiam ili prezentas al si ankaŭ
kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj en unu solan –
naturan.*

Bonan ŝancon!...

*Dume ni senlace aplikadu nian here-
zan, anterfaritan esperanton.”*

(El “Vortoj de kamarado”)

IOM DA POEZIO NECESAS...



Sapfo, tradukis K. Kalocsay

AMKONFESO

*Dio ŝajnas al mi la vir' feliĉa,
kontraŭ vi sidante, vin aŭskultante
kiu povas longe vin amadmiri
freŝe babili,*

*dolĉe ridi. Ve, kia bat' en koro,
kiam vin mi nur minutete vidas,
sufokiĝas en mi la voĉ', la lango
lame rigidas*

*eĉ balbuti, kaj delikataj fajroj
kuras vibre sub mia haŭt', mi brulas,
turnas min vertiĝ', la oreloj muĝas,
vido nebulas.*

*Ŝvito frida sur mia korpo fluas,
tremo kaptas min, la vizaĝ' pli palas
ol l' aŭtuna herb', oni kredas jam, ke
morte mi falas...*
